

## ...y Federico García Lorca

### *Somnambula romanco*

Verda, ĝin mi volas verda.  
Verda vento. Verdaj branĉoj.  
La ĉevalo sur la monto  
kaj la ŝipo sur la maro.  
Kun la ombro ĉe la zono  
kaj arĝento-frida gapo,  
verda karno, haroj verdaj,  
pensas ŝi en la verando.  
Verda, ĝin mi volas verda.  
Sub cigana lunoklaro  
la ĉirkaŭo ŝin observas,  
sed ŝi vidas nur la vakon.

### *Romance sonámbulo*

Verde que te quiero verde.  
Verde viento. Verdes ramas.  
El barco sobre la mar  
y el caballo en la montaña.  
Con la sombra en la cintura  
ella sueña en su baranda,  
verde carne, pelo verde,  
con ojos de fría plata.  
Verde que te quiero verde.  
Bajo la luna gitana,  
las cosas la están mirando  
y ella no puede mirarlas.

## ...y Fray Luis de León

### *Izola vivo*

Mi volas vivi sola,  
regali min per bonoj de l' ĉielo  
kaj vidí min izola  
sen amo kaj sen celo,  
sen la ĵaluzoj mordaj, sen kverelo.

### *Vida retirada*

Vivir quiero conmigo,  
gozar quiero del bien que debo al cielo,  
a solas, sin testigo,  
libre de amor, de celo,  
de odio, de esperanzas, de recelo.

## ...y un autor anónimo

### *La prizonulo*

Maje ĝi okazis, maje,  
kiam varmas la sezon',  
kaj kaniĝas la tritiko,  
kaj sin levas flor-odor',  
kiam kantas najtingalo,  
kaj respondas oriol',  
kiam la amantoj iras  
fari servojn al Amor',  
sed ne mi, la kompatinda,  
kiu sidas en prizon'  
kaj ne scias kiam tagas,  
kiam estas nokta hor',  
ĉar ne plu birdeto trilas  
ĉiufoje ĉe l' aŭror',  
Ĝin mortigis paf-arkisto:  
Di' lin punu kun rigor'!

### *El prisionero*

Que por mayo era por mayo,  
cuando hace el calor,  
cuando los trigos encañan  
y están los campos en flor,  
cuando canta la calandria  
y responde el ruiseñor,  
cuando los enamorados  
van a servir al amor,  
sino yo, triste, cuitado,  
que vivo en esta prisión,  
que ni sé cuando es de día  
ni cuando las noches son,  
sino por una avecilla  
que me cantaba al albor.  
Matómela un balletero;  
déle Dios mal galardón.

## ...y Gerardo Diego

### *La cipreso de Siloj*

El ombro kaj el songo, ŝpruc' rigida.  
Aflikto de l' ĉiel', ĉar pinta lanco.  
Gejser' strebanta stelojn en distanco  
per plilongigo vana kaj avida.

Soleca masto, revo izolita.  
Espero-dona sago en avanco.  
Veninte al la bordo de Arlanco,  
anime senespera, kore frida,

mi vidis vin majesta, dolĉa, garda  
kaj volis kun profunda sento arda  
scendi min solvante je kristaloj

kiel vi, turo svaga je profiloj,  
ekzemplo de deliraj vertikalaj,  
cipreso muta en fervora Siloj.

### *El ciprés de Silos*

Enhiesto surtidor de sombra y sueño  
que acongojas el cielo con tu lanza.  
Chorro que a las estrellas casi alcanza  
devanado a sí mismo en loco empeño.

Mástil de soledad, prodigio isleño;  
flecha de fe, saeta de esperanza.  
Hoy llegó a ti, riberas del Arlanza,  
peregrina al azar, mi alma sin dueño.

Cuando te vi, señorero, dulce, firme,  
qué ansiedades sentí de diluirme  
y ascender como tú, vuelto en cristales.

como tú, negra torre de arduos filos,  
ejemplo de delirios verticales,  
mudo ciprés en el fervor de Silos.

## ...y Jorge Manrique

### *Elegio je la morto de lia patro*

Niaj vivoj estas fluoj  
finiĝantaj en la maro  
morto-svene;  
tien rekte kaj sen bruoj  
malaperas nobelaro  
senrevene.  
Tien iras fluoj famaj  
kun humilaj kaj kun mezaj  
al la feĉo;  
tie ĉiuj estas samaj:  
la subul' kun taskoj pezaj  
kaj la reĝo.

### *Coplas a la muerte de su padre*

Nuestras vidas son los ríos  
que van a dar en la mar,  
que es el morir;  
allí van los señoríos  
derechos a se acabar  
y consumir;  
allí los ríos caudales,  
allí los otros medianos  
y más chicos;  
y llega dos, son iguales  
los que viven por sus manos  
y los ricos.

## ...y Gustavo Adolfo Bécquer

### *Rimo XIIIa*

Tutan mondon por rigardo,  
la ĉielon por ekrido,  
kaj por kiso via... kion  
mi ne donus por la kiso!

### *Rima XIII*

Por una mirada un mundo;  
por una sonrisa, un cielo,  
por un beso... ¡yo no sé  
qué te diera por un beso!

## ...e incluso Joan Manuel Serrat

### *Mediterraneo*

Eble ĉar infana mi  
daŭre viastrande ludas,  
eble ĉar la am' unua  
en kanejo dormas nun,  
tial do via parfum'  
min akompanas alglua,  
tial do ĉe via bordo  
restas ludo, am' kaj zorgo.

Mi,  
kies haŭto gustas jam  
l' akran ploran enverŝitan  
de popoloj cent en maron  
—Ĝibraltar' ĝis Istanbul'—  
por ke venku la lazur'  
la vintro-noktan vualon.  
Ofta misfortun' dolora  
igis vin profundakora.

Alkutimiĝis l' okuloj  
al ruĝaj krepusko-luloj  
samkiel lontan' al disto.  
Kantas mi se l' vino bonas,  
ludemas kaj fanfaronas  
kun koro de navigisto.

Sed ĉe la mar', ĉar min,  
min lulis Mediteraneo.

### *Mediterráneo*

Quizá porque mi niñez  
sigue jugando en tu playa  
y escondido tras las cañas  
duerme mi primer amor,  
llevo tu luz y tu olor  
por dondequiera que vaya  
y amontonado en tu arena  
guardo amor, juegos y penas.

Yo,  
que en la piel tengo el sabor  
amargo del llanto eterno  
que han vertido en ti cien pueblos,  
de Algeciras a Estambul,  
para que pintes de azul  
tus largas noches de invierno.  
A fuerza de desventuras  
tu alma es profunda y oscura.

A tus atardeceres rojos  
se acostumbraron mis ojos  
como el recodo al camino.  
Soy cantor, soy embustero,  
me gusta el juego y el vino,  
tengo alma de marinero.

Qué le voy a hacer, si yo  
nacé en el Mediterráneo.

**...y muchos más,  
de todos los países e idiomas que puedas imaginar.**

#### **Federación Española de Esperanto**

Rodríguez San Pedro 13-3º-7  
ES-28015 Madrid  
Tel./Fax: +34 914 468 079  
www.esperanto-es.net  
info@esperanto-es.net

Grupo o asociación local:

Todas las traducciones por Fernando de Diego salvo *Mediterráneo* por Antonio Valén  
Imagen del Quijote por Cleve Lendon, basada en original de Picasso, <http://purl.oclc.org/net/klivo>

versión 2002 08 01 · folleto disponible también en <http://www.esperanto.es.org>

# Cervantes habla esperanto

## *La inĝenia hidalgo don Quijote de La Mancha*

En vilaĝo de La Mancha, kies nomon mi  
ne volas memori, antaŭ nelonge vivis  
hidalgo el tiuj kun lanco en rako, antikva  
ŝildo, osta ĉevalaĉo kaj rapida levrelo.  
Stufaĵo pli ofte bova ol ŝafa en la matenoj,  
haketita viando kun salo preskaŭ en ĉiu  
nokto, grivoj kaj frititaj ovoj sabate, lentoj  
vendrede, kaj plie kolombido dimanĉe  
prenis tri kvaronojn de lia enspezo. La  
alian kvaronon konsumis velura saĵo,  
pluŝaj kuloto kaj pantofloj por la festaj  
tagoj, dum en la cetero de la semajno li  
kontentiĝis portante delikatan lanaĵon.

## *El ingenioso hidalgo don Quijote de la Mancha*

En un lugar de la Mancha, de cuyo  
nombre no quiero acordarme, no ha  
mucho tiempo que vivía un hidalgo de los  
de lanza en astillero, adarga antigua, rocín  
flaco y galgo corredor. Una olla de algo  
más vaca que carnero, salpicón las más  
noches, duelos y quebrantos los sábados,  
lentejas los viernes, algún palomino de  
añadidura los domingos, consumían las  
tres partes de su hacienda. El resto de ella  
concluían sayo de velarte, calzas de  
velludo para las fiestas, con sus pantuflos  
de lo mismo, y los días de entresemana se  
honraba con su vellorí de lo más fino.

